2.ª Ep. AÑO XII N.º 68 (204) JULIO - AGOSTO 1974

Boletin

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

# VALLADOLID KONGRESURBO POR 1974

ESPERANTO GRUPO
CALLOSA DE SEGURA
Alicante HISPANIO



«Casa del Sol» (s. XVI)

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

*Director:*
Domingo Martínez Benavente
*Redacción y Administración:*
Inés Gastón
Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
ZARAGOZA

*ADRESOJ*

Federación Española de Esperanto
(Hispana Esperanto-Federacio)
Oficina Central:
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15
Prezidanto:
S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16
Sekretario:
S-ro Manuel Figuerola Palomo
Str. Arturo Soria, 192, 3.º-D
MADRID-17
Kasisto:
S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2
MADRID-20
Ĉekkonto: N.º 8362-271
Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54
MADRID-6
Libroservo:
Federación Española de Esperanto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15
Informa-servo:
Federación Española de Esperanto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15
Eldona Fako:
F-ino Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
Ĉekkonto: N.º 17917, Bc. Bilbao
Coso, 31 ZARAGOZA
Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## de Secretaría

Laŭ konsento inter la Prezidanto kaj strarano pri eksteraj rilatoj de U.E.A., Prof. Dro. Ivo Lapenna; la Prezidanto de H.E.F., Prof. Angel Figuerola Auque kaj la Estraro de Hispana Esperanto-Federacio, Prof. Angel Figuerola prenis sur sin la taskon de enlanda komisiito por Hispanujo ĉe la Hispana Unesko-komisiono.

La unuaj elpaŝoj havis fruktodonajn rezultojn ĉar oni starigis planon por estontaj kontaktoj sur bazo de kvar punktoj, unu el ili la regula intersanĝo de vidpunktoj kaj reciproka kunlaborado.

*José M.ª González Aboín*
Sekretario de
Hispana Esperanto-Federacio

DONANTES DEL FONDO DE ADQUISICION DEL LOCAL EN PROPIEDAD (F.A.L.P.)

| | *Ptas.* |
|---|---|
| *Suma anterior* ... ... ... | 255.500 |
| Familia de D. Rafael Gisbert. | 2.000 |
| D. Antolín Colmenar y Doña Amalia Núñez Dubús ... ... | 625 |
| D. Abelardo Benet . ... ... ... | 500 |
| D. Conrado Berghänel ... ... | 1.000 |
| En memoria de M.ª G. M. ... | 50.000 |
| *Total* ... ... ... ... ... ... | 309.625 |

Madrid, 31 de mayo de 1974.

*Gerardo Flores*
Tesorero de H.E.F.

*Kongresa materialo*

Poŝtkartoj, unuo ... ... ... ... 4,— ptj.
Folietoj ses glumarkoj, unuo 4,— ptj.
Kovertoj, unuo ... ... ... ... 4,— ptj.

Mendoj kaj pagoj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, Dos de Mayo, 4, bajo. Valladolid.

## RUEGO DEL PRESIDENTE DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO A TODOS LOS ESPERANTISTAS ESPAÑOLES FEDERADOS, CON MOTIVO DEL XXXIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO A CELEBRAR EN VALLADOLID

Ha tenido lugar en nuestra Patria, recientemente, el XXVI Congreso Internacional de Esperantistas Ferroviarios, organizado por la Sección correspondiente de nuestra Federación, con lo que los congresistas hemos tenido la dicha de asistir a un acontecimiento de importancia extraordinaria en la historia del movimiento esperantista español.

Movido por el entusiasmo suscitado por los efectos ambientales, perenne todavía en mi ánimo, me es sumamente grato dirigirme a los esperantistas españoles federados, con el ruego de su adhesión, su colaboración y su asistencia personal al XXXIV Congreso Español de Esperanto, con el deseo y la esperanza de que este Congreso, sea con la valiosa cooperación de todos, otra nueva experiencia positiva y memorable de la vitalidad de nuestro común afán.

Valladolid va a ser por segunda vez sede de un Congreso Español de Esperanto. Lo fue la primera en julio de 1962, con motivo del XXIII Congreso Español de Esperanto, el cual estuvo coronado por el éxito en varios aspectos, que no es necesario reseñar aquí por hallarse aún vivo el recuerdo en la mente de los asistentes.

Sirva sin embargo a título de ejemplo, la mención de la bellísima e interesante conferencia pronunciada por el Excmo. Sr. Doctor Don Miguel Sancho Izquierdo, como uno de los actos más salientes del congreso.

Los representantes del movimiento esperantista vallisoletano, y por lo tanto, el Comité Local Organizador del XXXIV Congreso Español de Esperanto, cuentan con sobrada experiencia para llevar a cabo la organización de un congreso que satisfaga plenamente las aspiraciones y anhelos de todos los asistentes. Y lo confirma el programa de actos proyectado. Ocupan lugar destacado la Junta General de la Federación Española de Esperanto, para la que se hace necesaria la asistencia del mayor número posible de asociados, a fin de que la vida de la entidad no se anquilose, sino que cobre cada día mayor impulso como resultado de la iniciativa y colaboración, no sólo del número de asiduos participantes a nuestros Congresos, dispuestos a secundar todo intento que suponga promoción del Movimiento Esperantista, sino la asistencia y colaboración de cada uno de los federados. Y la excursión a Salamanca que si puede acompañarse de un acto cultural en la Universidad Salmantina, puede constituir un acontecimiento de alto valor práctico en orden a la propaganda para la difusión y afirmación del Esperanto, por lo que todo ello no puede dejar de merecer nuestra atención. Asimismo puede asegurarse que cada uno de los actos proyectados en el programa serán del mayor interés para todos los asistentes.

Es menester tener en cuenta al tratar de valorar el interés que pueda presentar un determinado congreso para justificar nuestra asistencia que todo Congreso Español de Esperanto, por encima de los resultados positivos o negativos que las apariencias permitan conjeturar, están sujetos a la aparición de incógnitas cuya resolución desborda a veces las previsiones mejor calculadas.

Tomemos como ejemplo de lo que queda expuesto el resultado del XXXIII Congreso Español de Esperanto celebrado en Madrid en el mes de julio próximo pasado.

El Comité Local Organizador vio frustrarse sus anhelos y propósitos por un conjunto de circunstancias imprevisibles que redujeron su labor a un 70 % según el plan concebido. De tal modo las circunstancias comprometieron el éxito del Congreso, que basta considerar para calcular su importancia negativa el hecho siguiente:

Habiendo dispuesto el entonces Ministro de Información y Turismo, excelentísimo señor don Fernando Liñán y Zofio, una entrevista con el Comité Local Organizador del Congreso, que habría dotado al mismo de todo el apoyo oficial necesario y de directrices para el desenvolvimiento del Congreso, conducentes al progreso de la utilización del Esperanto en actividades concretas; sin embargo debido a la reorganización interior de aquel Departamento Minis-

terial que tuvo lugar en aquel momento, dicha entrevista no pudo celebrarse, puesto que la comunicación del Sr. Ministro, concediéndola, no llegó a la Secretaría Central de la Asociación hasta haber transcurrido siete días después de la terminación del Congreso; en tanto que el escrito llevaba fecha anterior al comienzo del mismo. De no haber ocurrido esta circunstancia adversa, no hay duda de que el resultado de nuestro XXXIII Congreso Español de Esperanto hubiera alcanzado un éxito rotundo.

Pues bien, no obstante el lamentable contratiempo y sus consecuencias, el Congreso tuvo aspectos notablemente positivos; entre los que uno solo por sí mismo bastaría para justificar el esfuerzo, el sacrificio y todas las molestias sufridas por los congresistas para asegurar su participación en el Congreso y la garantía de su realización.

El aspecto o lado positivo del Congreso que nos ocupa, lo constituyó la labor que con tal motivo desarrollaron los medios informativos: prensa, radio y televisión, que tuvo como resumen los cuarenta minutos dedicados al Esperanto por Televisión Española, a comienzos del pasado mes de septiembre.

Ahora espera nuestra participación el XXXIV Congreso Español de Esperanto, acudamos a él con optimismo y deseo de colaboración. Valladolid, en otro tiempo capital de España, cuna de reyes y hombres ilustres en las Artes y en las Letras, y en otras muchas ramas de la actividad humana, es una ciudad atractiva, acogedora y laboriosa de gran abolengo histórico y cultural. Esto da al visitante la posibilidad de gozar de los atractivos de las ciudades florecientes y de los encantos que ofrece su valioso acervo cultural y artístico.

Una ciudad moderna, sin perder su fisonomía propia que ha alcanzado los medios necesarios para disfrutar del bienestar deseado.

Aprovechemos la oportunidad que nos brinda el XXXIV Congreso Español de Esperanto en Valladolid, para contribuir a la difusión del idioma común para todos los hombres y a nuestro enriquecimiento cultural.

*Angel Figuerola Auque*

---



## 57ª DATREVENO DE LA FORPASO DE DOKTORO ZAMENHOF


**14-an de aprilo 1974**

Okaze de la 57ª datreveno de la forpaso de Dro. Zamenhof, la Hispana Esperanto-Federacio omaĝis lian memoron per prelego, —en la hispana lingvo—, de nia samideano la Prezidanto de H.E.F., S-ro Angel Figuerola Auque, kies temo estis "La Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia utilo en la mondo".

La prelego, kiu estis publika okazis en la sidejo de H.E.F. en Madrid. S-ro Figuerola prezentis sian tezon ja interesa kaj je la fino devis respondi kaj klarigi plurajn demandojn de la neesperantista publiko, kiu interesiĝis pri la utileco kaj disvastigo de Esperanto.

Varma aplaŭdado premiis la laboron de la Prezidanto de H.E.F.

**LA VICPREZIDANTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO, DRO. ING. PAUL NEERGAARD, PRELEGIS POR LA HISPANAJ ESPERANTISTOJ.**



La 31-an de majo, kaj organizita de la Hispana Esperanto-Federacio, prelegis en Madrid, la dana sciencisto Dro. Paul Neergaard, Agronomia inĝeniero kaj Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Temo de la prelego estis:

"Patologio de la semoj. Intereso de la subevoluintaj landoj por la utiligo de la plantoj. Konveneco de la aplikado de Esperanto al ĉi tiuj studaĵoj."

La prelego, vera leciono ne nur pri la temo, sed, pri kaj la Esperanta Oratoreco, vekis la atenton de la publiko, kiu sekvis ĝin kun granda intereso.

La ĉeestanta publiko varme aplaŭdis je la fino.

La Estraro de H.E.F. invitis por partopreni tiun aranĝon, al specialistoj de pluraj sciencaj rondoj.

---

## FUNDACION ESPERANTO

A partir del próximo año el Premio "Sancho Rebullida" será dotado con 5.000 pesetas, en vez de con 2.000 pesetas como ha sido en años anteriores.

En la reunión que el Patronato de la Fundación celebró el día 15 de junio, el Dr. Sancho Izquierdo hizo entrega de los títulos para aumentar el capital que responde al Premio "Sancho Rebullida", de este modo el Dr. Sancho Izquierdo desea estimular a los concursantes en su labor.

---

Tres nuevos donativos hay que sumar a los ya recibidos para la Fundación, estos son los siguientes: D. José Gracia, de Zaragoza, 250 pesetas; Elena Gastón, de Zaragoza, 100 pesetas, y D. Gerardo Flores, de Madrid, 5.000 pesetas. Total recibido en 1974: 16.280 pesetas.

---

## NOTA DEL COMITE LOCAL ORGANIZADOR DEL 34 CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

Se ruega a los señores congresistas envíen lo antes posible su inscripción para asistir a los distintos paseos y excursiones, así como al banquete que se celebrará a la clausura del Congreso.

## KIE ESPERANTO ESTAS PAROLATA?

Jam estas proksima la dato de nia Hispana Kongreso de Esperanto. Post kelkaj tagoj, ni havos okazon plezure renkonti multajn gesamideanojn kaj geamikojn el la tuta Hispanujo, kaj ankaŭ eksterlandajn, kiuj alvenos al Valladolid por partopreni en kunsidoj kaj diversaj aranĝoj, kiuj okazos dum la Kongreso, sendube, la plej grava ĉiujara renkontiĝo de la anaro de la Hispana Esperanto-Movado. Dum tiuj tagoj ni ĉiuj kunvivos en tre agrabla etoso kaj rememoros neforgeseblajn pasintajn Kongresojn, kiuj ebligis al ĉiuj amike kaj frate interparoli Esperante kun multaj esperantistoj.

La estraro de la Hispana Esperanto-Federacio kaj la Loka Kongresa Komitato laboras diligente por plenumi la lastajn detalojn de la programo, kiun ili deziras prezenti al la esperantistaro per alloga kaj interesplena, kaj samtempe faciligi taŭgan oportunaĵon por uzadi Esperanton en konversacioj kaj aŭskulti la prelegantojn kaj bonajn parolantojn.

Dum la daŭro de la Kongreso estos konvene ke ni ĉiuj montru al la loĝantaro de Valladolid la veran mienon de la lingvo Esperanto per ĝia uzado en ĉiuj niaj interrilatoj. Samtempe ni devas plenumi la celon de Zamenhof, kiu kreis la Internacian Lingvon por ke ĝi estu la vivanta komuna lingvo, kiun la mondo bezonas por solvi la gravegan problemon de malkompreno inter homoj kaj nacioj. Tial, eĉ kiam la registaroj de la ĉefaj nacioj de la mondo interkonsentos instrui oficiale Esperanton en lernejoj kaj seminarioj, ni devas pruvi per nia praktikado, ke la personoj, kiuj kapablas paroli tiun komunan lingvon, ne necesas atendi tian dezirindan rezolucion internacian por ili interrilatiĝi kun alilandanoj, ĉu parole, ĉu per korespondado.

Nediskutebla fakto estas, ke Esperanto daŭrigas senĉese sian disvolviĝon kaj perfektiĝon kaj sekvas seninterrompe la samajn leĝojn de la aliaj lingvoj, kaj ke niaj kongresoj prezentas oportunaĵojn paroli ankaŭ kun eksterlandaj geesperantistoj, kun kiuj niaj interparoladoj sendube estos tre interesaj kaj fruktodonaj. Tiamaniere, ni samtempe profitas la utilecon de la lingvo, kaj pruvas al tiuj, kiuj ironie demandas kie Esperanto estas parolata, ke ĝi estas parolata, ĉie, kie oni renkontiĝas kelkaj esperantistoj el malsamaj landoj, kiuj deziras interkompreniĝi ne uzante interpretiston.

*Mariano Cantalapiedra Nieto*
Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato

## BIBLIOTECA-ARCHIVO DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO


En respuesta al llamamiento hecho en el número correspondiente a mayo-junio de BOLETIN solicitando la colaboración de todos para que en la Biblioteca-Archivo que BOLETIN ha logrado crear no falte la colección completa del órgano de la Federación que es base de la misma, D. Sacramento Collado Llana, de Sama de Langreo, ha enviado los siguientes números: 13-14-17-18 y 19 correspondientes al año 1950.

Mi agradecimiento al Sr. Collado Llana por su colaboración, a la vez que repito mi llamamiento aparecido en el anterior número de BOLETIN, con la esperanza de ser atendida y recibir los números que todavía faltan para poder completar la colección de nuestro órgano oficial. Los números que actualmente faltan son los siguientes: 1-2-3-4-8-9-10-12 y 15. Todos ellos correspondientes a los años 1949 y 1950.

Dirección: Boletín de la Federación Española de Esperanto. Paseo de Marina Moreno, núm. 35, 4.º dcha. ZARAGOZA.

*Inés Gastón*

Responde al la kondolenca telegramo sendita de Hispana Esperanto-Federacio, okaze de la forpaso de Lia Moŝto Dro. Franz Jonas, Prezidanto de la Aŭstra Respubliko, la Prezidanto de H.E.F., S-ro Angel Figuerola ricevis jenan leteron, kies tradukon mi publikigas.



REPUBLIK
ÖSTERREICH
BUNDESKANZLERAMT
1014 WIEN


WIEN 24.5.74

ÖSTERREICH
00400
GROSCHEN

An

die HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
p.A. Herrn Präsidenten Prof. A. FIGUEROLA-AUQUE,

Victor Della Serna 19/7° IZQ
Madrid 16.
SPANIEN



DER BUNDESKANZLER

Für den anläßlich des Ablebens des Österreichischen Bundespräsidenten Dr. h. c. FRANZ JONAS zugegangenen Beweis mitfühlender Anteilnahme bitte ich, aufrichtigen Dank entgegenzunehmen.

Wien, im Mai 1974

LA ĈEFO DE LA REGISTARO

Bonvolu akcepti mian plej sinceran dankon pro viaj vortoj de kondolenco okaze de la forpaso de la prezidanto de la Respubliko de Aŭstrio, D-ro Franz Jonas.

Subskribo: ...............

Vieno, majo 1974.

# LA OLIVOJ

(Komikaĵo)

*Personoj:*

TOTO. ... — la patro
ALINO ... — la patrino
MINO ... — la filino
POLO. ... — iu najbaro

Surstrata sceno.

To. La diabloj min prenu! Kiom terurega ŝtormo! Ŝajnis al mi, ke la tuta ĉielo dronos kaj la nubaro falegos sur niajn kapojn. Kaj nun; diru al mi, knabinaĉo; kion pretigis via patrino por manĝado? Aĉa fulmo ŝin mortigu! ĉu vi ne aŭskultas min? Knabinaĉo, ĉu vi dormas?

Mi. Ho, patro mia! tiel vi la pordojn rompos.

To. Senhontulino! kion vi respondas? Kie estas via patrino?

Mi. Tie ŝi estas, ĉe najbarina domo. Tien ŝi iris por helpi amikinon buligi fadenojn.

To. Malbenitaj fadenbuloj! Iru tuj kaj voku ŝin!

Al. Kial vi tiom krias, kriegemulo? Jam alvenis la homo de la grandaj misteroj; sendube li rikoltis etan brulignan ŝarĝon kaj li bombaste fanfaronas.

To. Ja, malgrandan, ĉu ne? Mi diras al vi je la ĉielaj spiritoj! ke kune, mi kaj via baptofilo, ambaŭ kune, mi rediras, ulinaĉo, ne eblis ĝin ŝarĝi.

Al. Ba! kaj kial tiom malseka vi alvenas?

To. Jes, kiel supo mi estas. Je via vivo!, donu al mi tuj, iom por manĝi. Je l' diablo.

Al. Je l' diablo, je l' diablo! Kion vi volas ke mi donu al vi? Nenion mi havas.

Mi. Patro, kiom malseka estas la brulligno, kiun vi alportis!

To. Ja, kaj poste via patrino diros kaj jesos ke ĝi estas pro l' matenroso.

Al. Rapidu, filino, pretigu paron da ovoj, por ke via patro vespermanĝu kaj preparu samtempe lian liton. Kaj nun, mia kara kaj amatega edzo... mi devas unufoje plu rediri al vi, ke vi neniam memoras pri la plantado de tiu olivarba draĵo, kiun mi, tiom multefoje, petis al vi ke vi plantu en nia bieno.

To. Malfeliĉulo, mi! Kaj pro kio vi pensas ke mi malfruiĝis? Mi prokrastis mian hejmrevenon, ĉar mia kara kaj amatega edzino... bezonis longedaŭran tempon por ĝin bonadapte kaj konvene planti laŭ via, por mi, ĉiam respektinda deziro.

Al. Silentu! kaj kie vi plantis ĝin?

To. Tie, tutapude la figarbon.

Mi. Patro, ĉion mi pretigis, vi jam povas eniri por vespermanĝi.

Al. Ho, mia edzo estimatega! Ĉu vi scias kion mi pensas? Ke tiu olivarba draĵo, kiun vi hodiaŭ plantis, post ses aŭ sep jaroj, produktos cent kilojn da olivoj, kaj tuj poste, pere de ŝtipoj tie kaj tie plantitaj, post dudek aŭ tridek jaroj, ni posedos egan kaj larĝan olivarbaron...

To. Sendube. Tia estas la vero. Kiom da talento vi enkape havas.

Al. Aŭskultu min atente! Ĉu vi scias kion plu mi pensis? Mi mem rikoltos la olivojn, vi alportos ilin hejmen per la azeneto kaj nia filino, vendos ilin en la vilaĝa placo. Sed, atentu; knabinaĉo, kaj ne forgesu, ke mi ordonas al vi, vendi ilin, ne malpli ol po cent pesetoj ĉiu kilo! Vi komprenis, ĉu ne? Ne forgesu, ĉar alie...

To. Kion vi diras? Ĉu je cent pesetoj? Ĉu vi ne scias ke mia konscienco ne povas min permesi tian altan prezon? Kvindek pesetoj sufiĉas pokile.

Al. Silentu! Ĝi indas, ĉar tiu olivarbo apartenas al la plej bona olivarba speco.

To. Ne gravas! Sufiĉas tio, kion mi diras.

Al. Aĥ! Ne rompu mian kapon! Aŭskultu min bone, knabinaĉo: mi ordonas al vi kaj zorgu ke vi ne vendu ilin je malplia prezo ol cent pesetoj, po kilo.

To. Ĉu ree, je cent pesetoj? Venu ĉi-tien, knabinaĉo! Je kioma prezo, vi devas vendi la olivojn?

Mi. Laŭ via volo.

To. Je kvindek pesetoj, po kilo!

Mi. Tiel mi plenumos ĝin, mia patro.
Al. Kion vi diras, malfeliĉa knabinaĉo! —"Tiel mi plenumos ĝin, mia patro"—. Venu ĉi-tien; je kioma prezo vi devas vendi la olivojn?
Mi. Je cent pesetoj po kilo.
To. Ĉu je cent pesetoj? La diablo vin prenu! Mi promesas al vi, se vi ne plenumas mian priprezan volon, mi punbatos vin per pli da ducent rimenbatoj, kaj nun diru, kiun prezon vi postulos?
Mi. Kiun vi diras, patro.
To. Je kvindek pesetoj! Ne forgesu! Ĥuuummm!
Mi. Tiel mi ĝin vendos, patro mia.
Al. Kion vi diras senhontulinaĉo! Ke vi ĝin vendos po kvindek pesetoj? Prenu, prenu, kaj prenu, faru tion kion mi ordonas al vi.
To. Lasu la knabinon!
Mi. Aj, aj, aj, patrino, aj, aj, aj, patro! Oni min mortigas!
Po. Kio okazas ĉi-tie, kial vi tiel batadas la filinon?
Al. Aĥ sinjoro! Tiu malfeliĉa viraĉo, kiu deziras vendi la produktojn de nia laboro, je tre malalta prezo kaj intencas tiel disfaligi mian domon! Olivoj kiuj estas grandaj kiel nuksoj!!!
To. Mi ĵuras je l' ostoj de miaj antaŭuloj! Ke ili estas eĉ ne kiel pinisemetoj!
Al. Ne tiaj, sed kiel nuksoj!
To. Ne tiaj, sed kiel pinisemetoj!
Po. Bonvolu najbarino, bonvolu eniri tien, dummomente, kaj tuj, ĉion mi enketos kaj ordigos.
Al. Enketu, enketu kaj ordigu. Mia edzo estas kapegulaĉo.
Po. Sinjoro, mia najbaro. Kio okazas pri la olivoj? Alportu ilin ĉi-tien, kaj mi aĉetos ilin ĉiujn kvankam ili estu mil kiloj.
To. Ne, sinjoro, ne; tio ne estas eble; vi trompiĝas. La olivoj ne estas ĉi-tie, hejme; ili estas en la bieno, ĉe mia kampara posedaĵo.
Po. Nu, alportu ilin tien-ĉi, kaj mi ilin aĉetos je ĵusta prezo.
Mi. Po cent pesetoj, kilo, diras mia patrino ke oni vendu ilin.
Po. Iom multekosta prezo, ĉu ne?
To. La samon mi diras.
Mi. Kaj mia patro, po kvindek, ĉiu kilo.
Po. Alportu ilin, ke mi vidu specimenon.
To. La diablo min prenu! Vi ne volas kompreni. Jen la vera historio de la olivoj. Hodiaŭ mi plantis en mia bieno, olivarban draĵon, kaj mia edzino jesas ke post ses aŭ sep jaroj, la arbo produktos cent kilojn da olivoj. Ŝi, poste rikoltos la olivojn, mi ilin hejmen alportos kaj nia filino ilin vendos en la placo. Krome, ŝi ordonas ke oni ilin vendu po cent pesetojn, ĉiukile. Ŝi diras, jes. Mi diras, ne. Tia estas la vera kaj ena kerno de l' problemo.
Po. Ĥa, ĥa, ĥa!!! Kian mirindan implikaĵon! Kian spritaĵon! Neniam mi aŭskultis ion, similan. Ĥa, ĥa, ĥa! Do, ankoraŭ ne estas la olivoj plantitaj kaj la knabino jam ricevis batojn pro ili.
Mi. Jes, sinjoro! Kiel ĝi ŝajnas al vi!
To. Ne ploru, filino mia! La knabino estas ega trezoro. Nun, iru, filino, iru kaj pretigu la tablon por vespermanĝi. Mi promesas al vi, ke mi aĉetos la plej belan jupon por vi, tuj kiam ni vendos la unuajn olivojn.
Po. Eniru, do, eniru do hejmen, kaj estiĝu paco inter vi kaj via edzino.
To. Adiaŭ, amiko. Dankon.
Po. Kiajn strangajn kaj groteskajn okazintaĵojn oni vidas dum la vivo. "Ankoraŭ ne estas la olivoj plantitaj kaj iliaj prezoj, estas jam diskutitaj."

*Scenaĵo aranĝita de F. de V. A.*

Félix de Valois Arana
15 - II - 74

# VIª FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

Kun ĉiam renovigita entuziasmo pasis la Franca-Hispana Esperantista Renkontiĝo. Ĝi estis la VIª en ĉi tiu vico de renkontoj organizitaj de la esperantistoj de ambaŭ flankoj de la Pirineoj.

Kiel anoncite, ĝi okazis en la belega urbo Biarritz (Francujo), krom la francaj esperantistoj, ĝin partoprenis, de la hispana flanko, esperantistoj de Santander, Bilbao kaj Zaragoza, entute 80 gepartoprenantoj.

Kiam la 3-an de majo vespere, la aŭtobuso de Zaragoza alvenis antaŭ la Hotelo "Florida", atendis nin la plej fruaj alvenintoj. Bonvenigis nin la organizanto de la Renkontiĝo, S-ro Jacques Decobert, de la Esperanto-Grupo "Pau-Adour". F-ino Tircazes, de sama Grupo, liveris al ĉiuj turismajn broŝurojn kun mapo de Biarritz, kaj la Esperanto-tradukon de la bela teksto de "Sono kaj Lumo" okazonta sabaton vespere fronte al la maro. Dum la alvenintoj ariĝis, intersalutis sin kaj babiladis, la ĝojo de la revido kun niaj francaj geamikoj divenigis la etoson en tre agrabla programeron.

Post la lokigo de la zaragozanoj en la hoteloj, kaj vespermanĝo de ĉiuj en Hotelo "Florida" venis la sekvanta punkto de la programo: Ripozo? Per tiu demanda punkto la organizantoj de la programo elmontris sian konon de la diversaj partoprenontoj. Post la vespermanĝo preskaŭ ĉiuj deziris viziti la urbon, la vetero estis agrabla, sed, kiam la pluvo, kiu akompanis nin dum la sekvantaj tagoj, bonvenigis nin, ĉiuj renkontiĝis en la Kazino aŭ en la Kinejo.

La esperantistoj de Bilbao, kiuj ankaŭ veturis grupe, same kiel niaj aŭstraj kaj svedaj samideanoj kaj la ceteraj francoj, kiuj partoprenis la Renkontiĝon alvenis sabaton matene.

Laŭ la programo fiksita, je la 10ª, ni vizitis la Centron por Sangdonado, Tie, ni estis akceptitaj de la Direktoro de la Centro, kiu klarigis al ni ĉiujn detalojn pri ĝia funkciado. Okazis simbola sangdonado flanke de la esperantistoj de la Grupo Pau-Adour, kaj de Zaragoza.

Je la 11,30ª okazis Oficiala Akcepto en la Urbodomo. Bonvenigis nin Lia Moŝto la Urbestro S-ro Guy Petit, kiu per tre afablaj kaj simpatiaj vortoj kuraĝigis nin daŭrigi en nia laboro por solvi la lingvajn problemojn en la homaj rilatoj. Ni devas danki ke, je la fino, li klopodis retrovi sian Esperanton de kiam li estis Liceano por denove bonvenigi kaj saluti la esperantistojn en la Internacia Lingvo. S-ro Seurin, Prezidanto de la Grupo Pau-Adour tradukis al Esperanto la vortojn de Lia Moŝto la Urbestro, kaj dankis lin nome de la esperantistoj. S-ro Laurent, Prezidanto de la Sud-okcidenta Federacio tradukis al la franca. Mi kunportis salutleteron de Lia Moŝto la Urbestro de Zaragoza, Dro. Mariano Horno Liria por lia kolego de Biarritz, en kiu li prezentis min kiel Prezidantinon de la Hispana Turisma Esperanta Sekcio. La sekcio donacis kovertojn kun hispanaj turismaj broŝuroj en Esperanto, informaj broŝuroj pri la Internacia Lingvo kaj memoriga cindrujo.



**Parto de la esperantistoj dum la Oficiala Akcepto en la Urbodomo.**

Tuj sekve, Lia Urbestra Moŝto kaj ceteraj Magistratanoj ĉeestantaj tostis kun la renkontiĝantoj por la sukceso de nia idealo. Post kiam ni dankis al S-ro la Urbestro lian akcepton kaj regaladon, ni lasis la Urbodomon kaj translokiĝis al proksima restoracio por komuna manĝado, kiu okazis en vere frata etoso.



La Urbestro de Biarritz salutas la renkontiĝantojn.

Je la 15ª ni translokiĝis al la pilkludejo por ĝui Vaskan Pilkludo-Spektaklon, kiu estis ja interesa, kaj, je la 17ª ni veturis al Bayona por viziti la urbon kaj Katedralon Sankta María. Bedaŭrinde la pluvo malebligis la viziton tra la urbo, sed, feliĉe por la virinoj oni profitis la tempon por butikumi kaj kompreneble ni vizitis la Katedralon, kiu estas vere vizitinda. Je la 19ª, ni daŭrigis la vojon tra la vaska lando ĝis urbeto Arcangues, kie okazis la komuna vespermanĝo kun folklora spektaklo ege bela. Ĉiuj dancoj kaj kantoj estis belaj, sed tiu nomata "danco sur la glasoj" estis miriga, bedaŭrinde per la foto, vi ne povos taksi la belecon de la danco. Dum la poŭzoj la hispanaj samideanoj gajigis nin per hispanaj popolaj kantoj de la norda ĝis la suda parto de la duoninsulo, ĉiuj regionoj estis reprezentataj per siaj kantoj. Gesinjoroj Seurin el Pau, bele kantis en Esperanto la konatan kanzonon "Santa Lucía".

Ĝi estis bela festo, plia programero, kiu kompensis la tuttagan pluvon. Reveninte al Biarritz ankoraŭ ni povis ĝui —la pluvo iomete ĉesis— la belegan prezentadon, SONO KAJ LUMO, fronte al la maro, ĉe la Granda Plaĝo.

Dimanĉon matene, post vizito de la Muzeo de la Maro (Esperante gvidata), ni veturis al la enfluejo de la rivero Adour, kie, en bela restoracio okazis ĜOJA AMIKA BANKEDO. La reganta entuziasmo pli kaj pli kreskis dum la manĝado en tiu agrabla etoso, sed... La tempo rapide pasis, kaj kun bedaŭro ni devis pensi pri la disiĝo.

Oni diras ke disiĝo estas iomete morti. Sed, ni sentis la esperon de nova Renkontiĝo, ĝi devos okazi venontjare en Hispanujo. Mi, kiel Prezidantino de la Hispana Turisma Esperanta Sekcio, interkonsente kun la francaj organizantoj kaj kun la hispanaj respondeculoj, invitis por okazigi la VII-an Franca-Hispanan Esperantistan Renkontiĝon en Huesca. La nomon de la urbo estis unuanime akceptita. Pri la dato, ni oportune informos en BOLETIN.

Antaŭ ol fini mi deziras kore gratuli al nia samideano S-ro Jacques Decobert pro la sukceso de la aranĝo, kaj lin danki pro lia sindediĉo. Li estis la animo de la organizado kaj per sia entuziasmo, li ebligis la realigon de tre bela programo, malgraŭ la forta pluvego, kiu bedaŭrinde akompanis nin dum tiuj tagoj.

Ĝis revido en HUESCA!!!

*Inés Gastón*



Vaska danco, dum la folklora fe[s]
en Arcangues.



# ANTAŬ LA XXXIVª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

*Iom pri la urbo, kiun ni vizitos dum la tuttaga ekskurso.*

## SALAMANCA

Plaza Mayor

Salamanca (legu Salamanka) estas kastilia urbo kun 124.000 loĝantoj, je 208 Kmj de Madrid kaj 119 Kmj de la portugala landlimo.

Ĝi situas apud la rivero Tormes, kaj sub bela blua ĉielo, ĝi estas la unua monumenta-arta kolekto el Hispanujo, laŭ Eugenio D' Ors.

Ĝi posedas la plej faman Universitaton en Hispanujo, ĉar ĝi estas tre glora kultura centro. La Universitato de Salamanca estis fondita de Alfonso la IXª de León, dum la jaro 1218. Ĝia fasado estas unu el la plej belaj de la platereska stilo. Ĝi posedas du enirpordojn, la ĉefan kun la medaliono de la Katolikaj Gereĝoj. Dum la XVª kaj XVIª jarcentoj, estis tiu ĉi Universitato centro de kleraj homoj kiel Francisco de Vitoria, kreinto de la Internacia Juro; Pastro Luis de León; Antonio de Nebrija, kiu publikigis ĉi tie, en 1492 la unuan hispanan gramatikon.

Oni povas diri ke eble la duono de la hispana klerularo de la nomata "ora jarcento" loĝis en Salamanca.

Belajn preĝejojn posedas Salamanca, ĉar ĝi estis ĉiam religia urbo. Ĝi posedas du Katedralojn: la Malnova Katedralo, impona montro de romanika arto, kun bela nervura volbo, kaj la nomata "Turo de la Koko" kun akitanaj kaj bizantinaj influoj. Ĝi estis komencita en 1140 kaj finiĝis dum la XIIIª jarcento.

La Nova Katedralo kaj la preĝejo Sankta Stefano estas du montroj de la gotika salamanka stilo. La Novan Katedralon komencis konstrui en 1513 Gil de Hontañón, kaj ĝi finiĝis en 1733. Interne, ĝi estas de impona alteco kun tri navoj de gotikaj volboj. En kapelo, interne de la Katedralo, estas konservata la Kristo de l' Cid aŭ de la Bataloj de la XIª jarcento.

La preĝejo Sankta Stefano de latina kruco kun unu sola navo, havas la ĉefan altaron, kiu estas grava verko de Churriguera. Ĝia fasado estas platereska kaj ankaŭ havas tre interesan klostron.

La preĝejo Sankta Martino reprezentas la plej romanikan arton en la XIIª jarcento.

En Salamanca estas ankaŭ belaj civilaj monumentoj kiel la nomata "Domo de la Konkoj" tiel nomata pro la 400 ŝtonaj konkoj de ĝia fasado apartenanta al la fino de la XVª jarcento kaj konsiderata kiel la plej taŭga reprezentanto de la civila arto dum la regado de la Katolikaj Gereĝoj. Alia civila monumento estas Palaco de Monterrey konstruita dum 1539, kaj ĝi estas la plej simbola palaco de la renesanca stilo en Hispanujo.

La granda monumenta riĉego de Salamanca kompletiĝas kun la Granda Placo, centro de la salamanka vivo. Ĝi estas portika placo kun tri etaĝoj da balkonoj, la tuto konstruita per la belaj orkoloraj ŝtonoj el Salamanca. En ĝia norda parto situas la urbodomo.

Hodiaŭ Salamanca estas krom religia urbo, moderna urbo plena je eksterlandaj kaj naciaj gestudentoj, plena je turistoj kun bona komerca kaj industria vivo.

Se oni volus mezuri, pere de unusola atesto, la intelektan vivon de Salamanca en la mondo, sufiĉus valori ĝian historian partoprenon en la Trenta Koncilio.

# HISPANA LIRIKO

*JUAN DE TIMONEDA (1490-1583) naskiĝis en Valencia. Kun Lope de Rueda, Timoneda estas unu el la patroj de la hispana teatro, kaj ankaŭ aŭtoro de tre spritaj rakontoj kaj de delikataj poemoj. Distingiĝis same kiel libristo, dediĉante sian kulturon kaj sian kapitalon al la presado de plej interesaj libroj. Unu el liaj ĉarmaj poemoj estas*


ESPERANTO GRUPO
CALLOSA DE SEGURA
Alicante HISPANIO


*Tempo tro rapidas*

Tempo tro rapidas, panjo,
do mi diras sen skrupul':
sola, mi ne dormos plu.

Kiel saĝa junulino,
ĝui junon mi aspiras,
certe ankaŭ vi deziras,
ke ne velku mia sino.
Jes, ripetos mi sen fino
kion mi jam diras nun:
sola, mi ne dormos plu.

Iu viro min tre amas,
volas esti al mi sklava.
Mi aspektas ne senrava,
en la lito baldaŭ flamas.
Mankas io? Io lamas?
Diru, mankas io? Ĉu?
Sola, mi ne dormos plu.

Ne 'stas mi negrino kruda
ignorata de Amoro,
sed knabino kiel floro,
bela kiel perlo nuda.
Sola dormu damo pruda
pro principo, sen plezur'.
Sola, mi ne dormos plu.

Mia korpo estas bela,
tion montras miaj kruroj,
la mieno, la femuroj,
la lanuga karno hela.
Panjo, longas tro, sencela,
nokto sen virobrakum'.
Sola, mi ne dormos plu.

Mankas al virin' trankvilo,
kiam ŝi dum nokto solas;
viron ĉiu damo volas
sub la sama lit-kovrilo.
Mankas ploro, mankas trilo
al virino sen parul'.
sola, mi ne dormos plu.

Tradukis: *F. de Diego*

---

Kiam la vizitanto adiaŭas la urbon, li trapasas la romanan ponton sur la rivero Tormes kaj se li rigardas malantaŭen, li vidos ankoraŭ la plej belan vidaĵon de la urbo: La silueton de ĝiaj Katedraloj. Kiam la suno brilas, ĝi ornamas la ŝtonojn de ĝiaj turoj. La ŝtono de Salamanca, mola, ĵus trancita el la minejo, akiras en la tempodaŭro tiun varman koloron de malnova oro pri kiu parolis Miguel de Unamuno dirante ke Salamanca havas iom da magio kaj iom da legendo.

*M. R. Urueña*

## CUENTA DE

*COBROS*

| | | |
|---|---|---|
| Saldo en 1-I-1973 | | 91.728,11 |
| Cuotas de 1972 | | 10.040,— |
| Cuotas de 1973 | | 65.560,— |
| Reembolsos 1973 (cuota más gastos) | | 42.504,— |
| Cuotas anticipadas de 1974 | | 5.790,— |
| Donativos 1973 | | 7.231,— |
| Cuotas Dumviva Membroj 1973 | | 20.000,— |
| Donativos para 1974 | | 730,— |
| *Congreso de Madrid* | | 1.281,— |
| Saldo a favor | 1.081,— | |
| Derechos de examen | 200,— | |
| Alumnos curso H.E.F. | | 1.900,— |
| Venta material Congreso | | 476,— |
| Venta Boletines | | 425,— |
| Intereses c/c Banco Español de Crédito | | 141,80 |
| Intereses c/c Banco de Santander | | 208,— |
| Donativos F.A.L.P. (255.500 — 156.000) | | 99.500,— |
| | | 347.514,91 |

## BALANCE DE SITUACION

| | | |
|---|---|---|
| *DISPONIBLE* | | 64.872,33 |
| Caja y Bancos. | | |
| *REALIZABLE* | | 86.055,— |
| Libro Servo. | | |
| *MATERIAL CONSUMIBLE* | | 7.650,— |
| Tarjetas, Cartas, Sobres, Sellos, etc. | | |
| *INMOVILIZADO* | | 729.736,— |
| Local en propiedad | 692.500,— | |
| Mobiliario adquirido | 8.160,— | |
| Mobiliario donado | 20.000,— | |
| Instalación eléctrica | 3.900,— | |
| Máquina de escribir | 4.016,— | |
| Fianza U. Eléctrica | 1.160,— | |
| | | 888.313,33 |

ANGEL FIGUEROLA AUQUE
*Presidente de la Federación Española de Esperanto*

GERARDO FLORES
*Tesorero*

# TESO RERIA AÑO 1973

*PAGOS*

| | | |
|---|---|---|
| Secretaría | | 13.513,— |
| Tesorería | | 3.857,50 |
| Imprenta Boloix | | 85.999,— |
| *Pagos pendientes en 1-I-1973* | | 9.511,— |
| Remesa boletín 1972 | 1.246,— | |
| Mat. propaganda E-Fako 1972 | 3.665,— | |
| Cuota U.E.A. 1972 | 4.600,— | |
| Gastos remesa boletín 1973 | | 6.838,60 |
| Heroldo y Monda lingvo problemo | | 830,— |
| *Gastos local y oficina* | | 17.530,— |
| Comunidad | 8.200,— | |
| Teléfono | 3.562,— | |
| Portero | 1.200,— | |
| Luz | 2.523,— | |
| Limpieza oficina | 1.000,— | |
| Varios | 1.045,— | |
| Gastos bancarios | | 147,90 |
| 8 sillas (salón conferencias) | | 1.760,— |
| *Local de Secretaría* | | 142.655,58 |
| L/ vto. 1-V-73 | 35.000,— | |
| Hipoteca (dos semestres) | 14.355,58 | |
| 12 efectos de 7.775,— Ptas. | 93.300,— | |
| | | 282.642,58 |
| *Saldo a cuenta nueva* | | 64.872,33 |
| | | 347.514,91 |

# EN 31 DE DICIEMBRE DE 1973

| | | |
|---|---|---|
| *EXIGIBLE* | | 340.374,94 |
| Efectos a pagar compra local | 264.350,— | |
| Hipoteca local | 76.024,94 | |
| *GASTOS A PAGAR* | | 31.847,— |
| Mat. propaganda E-Fako | 6.166,— | |
| Fact. Boloix (Bol. Noviembre-Diciembre 1973) | 19.445,— | |
| Cuota U.E.A. 1973 | 4.800,— | |
| Gastos remesa Boletín | 1.436,— | |
| *FUNCIONAMIENTO* | | 6.520,— |
| Cuotas 1974 (cobradas 1973) | 5.790,— | |
| Donativos 1974 (cobrados 1973) | 730,— | |
| *PATRIMONIO EN 31 DICIEMBRE 1973* | | 509.571,39 |
| Saldo en 31-XII-72 | 411.900,22 | |
| Excedente año 1973 | 97.671,17 | |
| | | 888.313,33 |

# CUENTA DE RESULTADOS AÑO 1973

## *INGRESOS*

| | | |
|---|---|---|
| Cuotas de 1972 | | 10.040,— |
| Cuotas de 1973 | | 72.850,— |
| Cobradas 1972 | 7.290,— | |
| Cobradas 1973 | 65.560,— | |
| Reembolsos 1973 (cuota más gastos) | | 42.504,— |
| Donativos 1973 | | 7.231,— |
| Cuotas Dumvivaj Membroj 1973 | | 20.000,— |
| Congreso Madrid (excedente y derechos de examen) | | 1.281,— |
| Alumnos curso H.E.F. | | 1.900,— |
| Venta boletines | | 425,— |
| Venta material Congresos | | 476,— |
| Intereses c/c Banco Español de Crédito | | 141,80 |
| Intereses c/c Banco de Santander | | 208,— |
| Donativos F.A.L.P. | | 99.500,— |
| Beneficio Venta Libros | | 4.579,— |
| *Suman los ingresos* | | 261.135,80 |

## *GASTOS*

| | | |
|---|---|---|
| Secretaría y Tesorería | | 12.920,50 |
| Valor material 1-I-73 | 3.200,— | |
| Gastos, compras 1973 | 17.370.50 | |
| | 20.570,50 | |
| Valor material 31-XII-73 | 7.650,— | |
| Consumido durante 1973 | 12.920,50 | |
| Imprenta Boloix | | 85.999,— |
| Gastos remesa Boletín | | 6.838,60 |
| Heroldo y Monda Lingvo Problemo | | 830,— |
| Gastos local y oficina | | 17.530,— |
| Gastos bancarios | | 147,90 |
| Pendientes de pago | | 31.847,— |
| Mat. propaganda E-Fako | 6.166,— | |
| Fra. Boloix (Bol. Noviembre-Diciembre) | 19.445,— | |
| Cuota U.E.A. 1973 | 4.800,— | |
| Gastos remesa boletín | 1.436,— | |
| Intereses hipoteca local | | 7.351,63 |
| *Suman los gastos* | | 163.464,63 |
| *Excedente* | | 97.671,17 |

ANGEL FIGUEROLA AUQUE
*Presidente de la Federación Española de Esperanto*

GERARDO FLORES
*Tesorero*

# RAPORTO PRI LA POSTKONGRESO DE I. F. E. F. OKAZINTA EN CALELLA DE LA COSTA

Ekde la 18a ĝis la 21a Majo 1974



Grupo da partoprenantoj en la Postcongreso

Pere de nia H.E.F.-a Bulteno, intencas mi sciigi ĉiujn interesatojn pri la diversaj okazintaĵoj, okaze de la I.F.E.F.-a Postkongreso en Calella. Mi priskribos, laŭde, la diversajn aktojn kaj ekskursojn.

*18an. de Majo: Sabate;* Je la oka, matene, tuj post la tagiĝo kaj akurate, beninda akurateco! per speciala trajno, translokiĝis ĉiuj la Kongresanoj en Barcelonon, kien ni alvenis je la deka matene.

Tuj poste, oni adiaŭis fare de la postkongresanoj, la aliajn gesamideanojn kiuj ne eblas partopreni la Postkongreson en Calella, kaj oni komencas la Postkongreson per tuttaga ekskurso tra Barcelono, vizitante la plej elstarajn vidindaĵojn de la Urbego.

Nia unua vizito estis al la Fervojista Muzeo kiu situas en la sama Stacidomo kie ni eltrajniĝis, kaj tuj poste la 180 postkongresanoj enaŭtobusiĝis en antaŭmenditajn aŭtobusojn por viziti la urbodomon, kie ĉiuj admiris la belajn kaj imponajn brunruĝajn pentraĵojn de Sert, kaj la egan, solenan kaj klasikaj salonon de l' "Tinell".

Samideano Pedro Nuez el Barcelono, klarigis per sia majstre regata esperanta lingvo, la sciindaĵojn pri la Urbodomo, ĉu artajn, ĉu historiajn. Ĉe apuda trinkejo, S-ro Nuez, regalis nin ĉiujn, per tipa dolĉa hispana pokalo da vino, kiun ni senescepte el trinkis tutgorĝe, ĉar pro la tiutaga varmego, ni sentis nin tiam, vere kaj ege soifantaj.


Ree per aŭtobuso, ni veturis en la faman "Tibidabo" monteton, kie okazis pikniko, kiun ni nepre bezonis, ĉar ĉiuj estis malsataj. Post ripariga, surmonta manĝado, oni vizitis la mirindan templon de la Sankta Familio, ekkonstruitan antaŭ unu jarcento kaj ankoraŭ nefinita. Ĝia mirinda fasado forte impresis ĉiujn, pro ĝia beleco, svelteco, kaj nekutima stilo; la tutmonde fama konstrustilo de Antonio Gaudi, elstara kataluna Arĥitekto.

La lasta ekskursa vizito okazis ĉe la tiel nomita "Hispana Vilaĝo", situanta sur la supraĵo de la monteto "Montjuich" (Monto de la judoj). Tiu "Hispana Vilaĝo", unika ĝiaspece konstruaĵo, enhavas, laŭskale reproduktitan, unu el la plej elstaraj domoj el ĉiu el la provincoj hispanaj, kaj tiaj konstruaĵoj ordigitaj laŭstrate, konsistigas belan kaj vizitindan vilaĝon, el kiu oni povas eltiri ideon pri la tuta Hispanio.

Post tiu vizito, ni forlasis "Hispanan Vilaĝon", por vespermanĝi en la turo nomita "San Sebastián" (Sankta Stefano), situanta ĉe la haveno mem 120 metrojn alta. Bela kaj vasta restoracio sur la supraĵo de la fera konstruaĵo, kie ni ĉiuj vespermanĝis en frata kaj samideana etoso. Oni babilis, manĝis, tostis, trinkis kaj ridis feliĉe.

Post vespermanĝo, je la deka, oni la urbon rondiris kaj niaj aŭtobusoj startis la lastan veturadon, cele al la urbo de la Postkongreso Calella de la Costa, kiun ni atingis je la 11ª de la nokto.

Du hoteloj "Catalonia" kaj "Santa Fe" estis antaŭmenditaj por akcepti la verdstelajn geportantojn, kaj tie ili tranoktis sian unuan nokton en Calella, por ripozigi siajn lacajn korpojn.



Amika rondo. Dum la klaso de Esp. inter-aciaj gastoj vizitis la Klubon de Calella. Jnuaj en la vicoj sidas P. Claramunt kaj Sro. de Valois.

*19an. de Majo: Dimanĉe;* Je la 10'30, okazis ekumena Diservo, ĉe la "Piaj Lernejoj" kaj sinsekve salutkunveno en la Salono de la sama kolegio. Pastro Claramunt mesoferis kaj predikis esperantlingve Dum la Meso, kantis la Grupo de Kantistoj, esperantlingve kaj katalune. Protokolis samideano Alberich el Barcelono kaj salutis unue P. Claramunt kaj S-ro De Valois, nome de la Grupo esperantista de Calella. Prezidis Sro. Ten, Vicurbestro de Calella, S-no Walter el Germanujo, S-no Puig, Prezidanto de esperanta movado en Sabadell kaj Pastro Claramunt, Prezidanto de esperanto-grupo el Calella.

Sinsekve, la diversaj reprezentantoj kaj delegitoj alilandaj salutis la ĉeestantaron nome de siaj respektivaj lokaj kaj naciaj grupoj.

Oni inaŭguris la kunvenon per komuna kantado de la Himno, kaj poste la grupo de kantistoj de la "Piaj Lernejoj", interpretis diversajn kantaĵojn, inter la salutojn diverslandaj. Oni kantis "La Tagiĝon"; eŭropan himnon de la paco, ŭntitolita "Tuj la pordoj malfermiĝos", laŭ muziko eltirita el la naŭa Simfonio de Von Beethoven, kaj tipan katalunan "Sardana", akompanate fortepiane de S-no De Valois.

Tuj poste, ĉiuj piediris por la inaŭguro de la nova "Strato ESPERANTO", kiun prezidis lia vicurbestra Moŝto S-ro Ten, nome de la urbestro Sro. Llobet. Esperantistoj restas tre dankemaj, pro lia helpo kaj simpatio al nia movado. Inaŭguraj vortoj, estis alparolitaj esperantlingve de S-ro Ten, per tre korekta kaj klara prononcado, komprenebla al ĉiuj, kiuj tondre aplaŭdis, ĵus finita la inaŭguro.

Je la dua, posttagmeze okazis frata kunmanĝado kun ĉeesto de multenombraj katalunaj samideanoj kiuj nin akompanis kore, okaze de la inaŭguro de la "Strato Esperanto" kaj por profiti okazon saluti persone tiom da diverslandaj gesamideanoj.

Post la tagmanĝo, S-ro Ten, hotelestro de "Catalonia", metis je nia dispono, dum la tuta vespero, la suban dancsalonon de la Hotelo, kie oni lotumis diversajn donacojn de la membroj esperantistaj de Calella, kaj samtempe oni trinkis kaj dancis ĝis la sunsubiro.

*20an. de Majo: Lunde;* Post libera mateno, posttagmeze, ĉiuj enaŭtobusiĝis kaj veturis al Lloret de Mar, fama turista urbo, kaj al Blanes, kie oni vizitis mirindan botanikan ĝardenon, kiu ege plaĉis al ĉiuj. Vespere je la deka, esperanta anaro iris en noktan kabaredon por ĉeesti tipan "flamenko-dancadon" kaj samtempe danci, kion tre ĝoje kaj gaje faris ĉiuj geesperantistoj, ĝis la dua, matene.

*21an. de Majo: Marde;* Tuj kiam sunleviĝis, ĉiuj ellitiĝis akurate, ĉar hodiaŭa tago estas destinita por tuttaga perŝipa ekskurso. Bela vetero, brila kaj iomete bruliga suno, trankvila la surfaco de la maro kaj ebena kvazaŭ stratpavimo, akompanis nin la tutan tagon.

Surmara ekskurso ege agrabla kaj neforgesebla!

Laŭlonge de "Ora kaj Klifa Marbordo", ni vizitis Tossa de Mar, antikva romia vilaĝo, ornamita de svelta kastelo situanta sur la pinto de suda monteto ĉe la eniro mem de la haveno. En tiu-ĉi vilaĝo ni ripozis dum tri horoj por baniĝi, promeni, suvenirojn aĉeti kaj tagmanĝi laŭmende.

Post la tagmanĝo ĉiuj akurate enŝipiĝis ree, por daŭrigi nian perŝipan ekskurson ĝis San Feliu de Guixols, el kie ni reveturis en Calellan, kiun ni atingis je la sepa posttagmeze.

Dum la perŝipa reveno en la postkongresan urbon, oni fermis oficiale la Postkongreson, kvankam la lasta adiaŭo samideana, okazis ĉe la Hotelo Santa Fe, kie post vespermanĝo, ĉiuj ree kuniĝis por interfrata kaj lasta manpremo adiaŭa. Oni interparolis kaj oni ronde dancis kaj akompanate de fortepiano oni kantis la Himnon "La Espero" kaj aliajn esperantajn kantaĵojn.

Adiaŭaj vortoj, finaj salutoj, ĉirkaŭbrakadoj samideanaj, bondezirenhavantaj vortoj fare de ĉiuj al ĉiuj kaj laste:

BONAN VOJAĜON AL ĈIUJ, EN ILIAN PATROLANDON.

Ĝis la revido, karaj gesamideanoj!

*Félix de Valois*

Calella la 24an de Majo de 1974.

---

## REVUO DE LA REVUOJ

Diras INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO, n.º 1, 1974: "La angla havas en Eŭropo, Nordameriko, Australio kaj partoj de Azio kaj Afriko ankaŭ supernacian signifon. Ĝi eĉ estas por elitaj grupoj de la tuta mondo, t. e. incluzive de Sovetio kaj Ĉinio, monda lingvo, nur ĝi ne povas fariĝi tia pro la prestiĝaj ambicioj de ĉiuj grandaj lingvoj. Do la angla principe daŭros esti mondregiona lingvo. Tio signifas ke la plano enkonduki Esperanton kiel lingvon de Eŭropo devas renkonti la fortan reziston de la jam establita kaj pli kaj pli solidiĝanta angla lingvo. Ni opinias, ke tamen utilas plu pledi por Esperanto en Eŭropo, sed ĉiam samtempe akcenti ĝian karakteron kaj pretendon kiel monda lingvo. Ni devos koncedi, ke ni certe ne venkos pro propra forto, sed nur pro la interĵaluzoj de la aliaj. Kun la racio de la homoj oni apenaŭ povos kalkuli. Ekkoni tiun situacion kaj el ĝi ĝuste profiti estus la tasko de lerta Esperanto-politiko".

Solidaj, saĝaj vortoj. Sed la tubero en la afero kuŝas en tio, ke ankaŭ ni, esperantistoj, estas homoj, kun kies racio same oni apenaŭ povas kalkuli. Kiel ni povus venki pro la interĵaluzoj de la aliaj, se ni mem ne kapablas prezenti unuecan fronton, kaj nia preferata ludo estas kvereli, disputi, bruadi inter ni kaj fari grupojn, grupetojn kaj frakciojn interne de niaj anemiaj vicoj? Ĉu vi volas pruvon? Daŭrigi la legadon...

* * *

Kiam mi razas min antaŭ la spegulo, mi scivole-timeme observas, ĉu mi jam komencas transformiĝi en bavantan hundon. En SAT-AMIKARO, n.º 297, junio 1974, la *Komitato de Sat-Amikaro* sub la titolo *Pri iu bulteno* asertas, ke "[F. de Diego] ...kuraĝe bojas kontraŭ la transpireneaj laboristoj esperantistaj dum li servutmaniere silentas pri la sennomaj okazintaĵoj de la faŝista reĝimo hispana", kaj ke "F. de Diego videble ŝatas nek nian k-don N. Barthelmess, nek lian ĵus aperitan [*tiele!*] verkon *Ne plu ludo*... Tion F. de Diego rajtas opinii, sed tra Barthelmess li videble provas atingi niajn laboristajn organizojn SAT kaj SAT-Amikaro sensukcese".

Dankon, ke mi *rajtas* opinii almenaŭ pri io!

Mi havas nenian motivon persone ŝati aŭ malŝati s-ron Barthelmess. Por mi, li estas nura abstraktaĵo. Sed lian verkon *Ne plu ludo*... mi recenzis mallaŭde (BOLETIN n.º 63, septembro-oktobro 1973), ĉar mi opinias ĝin arte

kaj lingve fuŝa kaj ideologie mucida kaj trempita en ia primitiva, sentimentalaĉa manifieismo, kiun li nomas... socialismo!

Diri, ke mi bojas "kontraŭ la transpireneaj laboristoj" kaj ke mi "provas atingi la laboristajn organizojn SAT kaj SAT-Amikaro" estas unu el la plej amuzaj kretenaĵoj, kiun mi iam legis.

Aliajn eldonojn de SAT, kiel por ekzemplo, *Infanoj de la malriĉuloj*, de J. A. Lee, mi senrezerve laŭdis kaj rekomendis rilate la enhavon kaj rilate la formon. Ĉu tiuj favoraj recenzoj estis ankaŭ "bojado kontraŭ la transpireneaj laboristoj"?

Ni estu seriozaj, estimata *Komitato de SAT-Amikaro*. Se s-ro Barthelmess ne havas verkistan talenton (kvankam mi ne dubas, ke li brilegas en aliaj fakoj) kaj se lia ideologio urĝe bezonas aktualigon, ne mi kulpas, sed li.

Alia aspekto de la artikoleto subskribita de la *Komitato de SAT-Amikaro* meritas apartan mencion. Ĝi diras: "Samdate la mondo eksciis pri la sovaĝa ekzekuto de hispana junulo, Salvador Puig Antich, laŭdire anarkiisto, mortkondamnita laŭ pruvoj certe ege 'misteraj'. Ni supozas, ke vi nenion legos pri tio en BOLETIN sub la lerta plumo de F. de Diego. Vi nur trovos kritikojn al eksterhispanaj okazintaĵoj. Tio estas pli facila!".

Ne, sinjoro, vi ne trovos tiajn novaĵojn, ĉar BOLETIN estas politike neŭtrala organo (tiaj funkcioj apartenas a la gazetaro, al la radio kaj al la televido): kaj ĝuste pro la sama motivo BOLETIN ne traktas eksterhispanajn (politikajn) okazintaĵojn. Ekzamenu la kolekton! Tio, ke la malon asertas la *Komitato*, nur montras ankoraŭfoje, kiom ĝi respektas la veron.

Nu, mi, hundo —rabia?—, servutulo, kiu, laŭ *la Komitato* neniam spertis la nedireblan feliĉon renkonti komitaton demokratie elektitan, bedaŭrinde devas meti finan punkton, ĉar mi jam bojis sufiĉe, ĉu ne?

* * *

En NORVEGA ESPERANTISTO, n.° 2, 1974, aperas la jena anonceto: "28-jara ministro deziras korespondi kun norvegaj familioj. Beleznai Janos, Gyori u 16, Tatabanye, Hungarujo".

Vere brila junulo, jam ministro en sia 28-jara aĝo! Sed mi suspektas, ke temas pri unu el tiuj "ministroj", kiuj elfosas karbon...

* * *

Pri la lokaj societoj Esperantaj aperis interesa komento en REVUE FRANCAISE D'ESPERANTO - FRANCA ESPERANTISTO, n.° 285, aprilo 1974: "Nu, eble la plej grava bezono de la Movado kuŝas nuntempe en la vivo de la grupoj, tro ofte kadukiĝantaj: necesas redoni al ties membroj la konscion, ke ili konsistigas la kernojn de la varbado. Internacia kaj naciaj, la administraciaj centroj povas faciligi sed neniel anstataŭi la nemalhaveblan rolon de la lokaj societoj. La nacia asocio, influante la nacian gazetaron, intervenante ĉe la naciaj institucioj, igas favora al la lingvo la publikan opinion; liverante la librojn netroveblajn en la komerco, zorgante pri la biblioteko, eldonante varbomaterialon, kunordigante prelegvojaĝojn aŭ organizante migran ekspozicion, per siaj servoj ĝi certe helpas la surlokan agadon. Sed eĉ ĉio ĉi restus senvalora, se la lokaj grupoj ne povus certigi surlokajn kursojn kaj regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn, unuvorte la sociajn rilatojn, kiuj solaj kapablas ne nur alligi sed precipe aktivigi la membrojn".

Eble nun la inflacio, la benzino multekosta, la mizeriĝo de la ekonomiaj cirkonstancoj puŝos denove multajn esperantistojn rifuĝi en la neelspeziga saloneto de la loka grupo. Eble ni eltrovos, ke Esperanto estas ankaŭ fidinda termometro pri la ekonomia situacio de la popoloj. Ju pli prosperaj la lokaj grupoj, des malpli kontentiga la financa stato de la lando. Ĉu eble la finan venkon de la lingvo de la hebreo Zamenhof ni ŝuldos al la neintencita kunlaborado de la araba petrol-politiko?

Kun plej koraj salutoj, ĝis la proksima revu-rikolto,

*F. de Diego*

## *Ni legis por vi...*

LA ARBO DE LA SCIADO, de Pío Baroja. El la hispana tradukita de Fernando de Diego. Aŭtoro —kaj verko— prezento de Juan Régulo Pérez. Tiu ĉi eldono celas kunmemori en Esperanto la centjaran naskiĝdatrevenon de la plej granda romanisto de la 20-a jarcento. 16 × 22 cm. 256 (4 eksterteksta j + XX + 232) paĝoj. Prezo 260 pesetoj.

Eldono de J. Régulo Pérez, sub marko STAFETO.

**Estas absolute evidente, ke ni troviĝas antaŭ plensignifa romano, laŭ diversaj kaj riĉaj aspektoj, kiujn ni, kore sinceraj, ne povas preterlasi en la okazo fari recenzan konsideradon kaj, vole-nevole, primediti la lecionon, kiun la verko nun, proponas al ni, per ĉi tiu skrupula versio en Esperanto.**

Estus pedante prezenti eseeton pri la personeco kaj la beletra elstaro de Pío Baroja, por tiel povi ŝveligi ĉi-tiun tekston temantan pri la mirinda traduko, kiun kulminigis Fernando de Diego. Sed ni licas atenti almenaŭ kelkajn trajtojn, jen de la aŭtoro, jen de la romano, por pli bone penetri en la kernon de la tuto.

Mi legis kun streĉa atento la absorban libron, kaj en ĉiu paragrafo mi havis plenan konscion pri la etika pensmaniero de la vaska kastili-lingva verkisto. Sed, samtempe, mi gustumadis la tiel naturan esperantan lingvaĵon, same kiel oni kapablas fari pri originala virtuoza stilo.

La filozofieca konstanto de la romano taŭgas, ĉiumomente, por ke la leganto konsciu pri vivproblemoj flagrantaj en la interna mondo de la protagonistoj. Tiuj problemoj, iom ekzistencialismaj, ne estas nuraj pretekstoj por ke la aŭtoro trudu al ni sian privatan ideologian senton. Oni povas pli-malpli identiĝi kun la pensmaniero de Baroja, kaj, konsekvence, juĝi ĝin favore aŭ ne, laŭ propra ĝenerala kriterio, sed ni devas admiri, kiel li sin konfesadis tute nature, vivigante konsekvencajn kaj koherajn personojn; kaj kiel la ĉapitroj, laŭ tre karakteriza simpla teĥniko, fluas perfekte kaj reliefigas epizodojn de nia propra enlanda historio, malkovrante, denuncante hipokritecon kaj negativajn punktojn de pruda moralo.

Ni povas, do, facile imagi, ke tiu romano estas plena je subtilaĵoj: do, ke la laboro de la tradukinto... Bone! Ĉar ni, nun, jam komencas pritrakti la taskon de F. de Diego, ni diru ke ĉiu malfacilo fontanta el la originala teksto, estis tute simple asimilita de la transkribinto, pro lia profunda lingvokapablo, ĉar li faras plej ortodoksan kreipovan ĵongladon. Ĉiu bona gustumanto aŭ frandemulo, tion suspektante, konscias pri la majstra ellaboriteco, kiu estas proponita al ni, tiel inde kaj efike. Oni perceptas neniun stumblon. Ŝajnas ke ĉio, tiele, eliris el la cerbo de la romanisto, pensante jam per la Zamenhofa idiomo.

Jen, do, tiu karakteriza laboro de F. de Diego, kiu ŝvebas, ne kiel nubo kies ombro makulas la teron, sed kiel nubo ora, kiu karakterize nuancas la pejzaĝon, do, oni ne rajtas paroli pri eraroj aŭ simplaj misoj. Ni parolu nur pri "preferoj" plenkonscie enkondukitaj, kaj, precipe, pri "neologismoj" kiuj pli kaj pli integriĝas en la komunuzan vortaron. Eble, nur pri *aperti* (malfermi), iu povas malkonsenti ĝis certa grado, konsiderante, ke la koncerna radiko, laŭ PIV, estas adjektiva kun ideo de stato, kiu ne estas rezulto de ago.

La Belliteratura Serio "Stafeto" rangas denove je granda prestiĝo pro la aranĝo de la libro kaj ties modele sobra-eleganta presado. "Stafeto" fariĝis jam, bonŝance, 20-jara, kaj tio estas plensignifa en la eldona historio de Esperantujo. Prof-ro J. Régulo solenigas ĝin per ĉi tiu titolo, kiu, inter aliaj meritplene pliglorigos la jam atingitan renomon. Kaj la eldonisto mem verkis trafan esean enkondukon, kiu situigas nin en la ĝustajn epokon kaj historian etoson de la tiel nomata hispana "Generacio de la jaro 1898-a, (kies gravaj kaj ĉefaj intelektuloj tiel perfekte kapablis bildigi tiujn krizajn jarojn) kaj portretas tre ĝuste la personecon de la fama romanisto, —kaj ankaŭ kuracisto—, kiel la ĉefrolulo de la "Arbo de la Sciado".

Oni devas tutkore gratuli kaj la tradukinton kaj la eldoniston, kaj varme rekomendi al ĉiu esperantisto la legon kaj propagandon de ĉi tiu modela verko, kaj des pli nun, kiel omaĝon al Pío Baroja, en ties centa naskiĝdatreveno.

Jen: la vivanteco kaj efiko de la Lingvo montriĝas per ĉi tiaj altkulturaj evidentaj atingoj. Sed, bedaŭrinde, la mondo tion ignoras obstine.

*G. Mora*

## ĴUS APERIS

En eldona de Hispana Esperanto-Federacio, nova dokumento de CED en hispana lingvo. Ĉifoje temas pri la Dok. CED, A/II/I

**"el problema lingüístico en las relaciones internacionales"**

Aŭtoro de la Dok. estas Prof. Dro. Ivo Lapenna. Originala titolo en Esperanto, "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj". Broŝuro 36-paĝa, 22 × 15 cm. Prezo 15 ptoj.

---

ATENCION

A partir del día 15 del mes de julio, los servicios de Eldona Fako e información estarán cerrados hasta el día 30 de agosto.

---

# ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Dum la monato majo okazis la printempaj festoj en Zaragoza, dum ili en du okazoj Esperanto ludis rimarkindan rolon.

Unue kaŭze de la elekto de Internacia "Maja". La fraŭlinoj, kiuj prezentiĝas en ĉiu regiono al tiu Konkurso, krom esti belaspektaj, graciaj, ktp. devas prezenti siajn meritojn pri klereco. En Zaragoza estis elektita kiel "Maja de Aragón" nia samideanino Florinda Marqueta Siibert, kiu inter siaj meritoj pri klereco, sin prezentis kiel interpretistino, ŝi scipovas krom la hispana, la francan, anglan, kaj Esperanton. Pluraj intervjuoj aperis je tiu okazo en ĵurnaloj kaj per radio, same en Zaragoza kiel en Madrid kaj Segovia, kie oni elektis la landan reprezentantinon. Kvankam en nia lando, Esperanto estas sufiĉe konata de la informaj medioj, en ĉiuj intervjuoj, Florinda Marqueta profitis por rimarkigi la neceson de Esperanto por internaciaj rilatoj.

La 26-an de majo kunvenis en Zaragoza ĉiuj landaj reprezentantinoj por esti elektita "Maja Universal". Partoprenis la Konkurson fraŭlinoj el 39 Landoj, al kiuj akompanis ĵurnalistoj el ĉiuj landoj. F-ino Marqueta, "Maja de Aragón" rolis kiel interpretistino kaj —ni diru— por publikaj rilatoj. Bedaŭrinde, inter tiom da eksterlandanoj neniu parolis la Internacian Lingvon, nur unu, finna ĵurnalisto, aŭdis paroli pri Esperanto, okaze de artikolo aperinta en finna ĵurnalo.

## *Due, Esperanto en la SPORTO*

De la 18ª de majo ĝis la 2ª de junio, okazis la "II Juegos Polideportivos Inter-Clubs" organizitaj de "Centro Natación HELIOS". Ilin partoprenis 18 Kluboj en ok malsamaj sportoj, —Pilkludo, Naĝado, Korbopilko, Futbalo, "Petanca", Teniso, Atletismo kaj Pirogismo—, en ĝiaj diversaj apartaĵoj.

Pluraj el la sportistoj, kiuj partoprenas tiujn ludojn estas ne nur naciaj sportistoj, sed ankaŭ internaciaj, tial, ni antaŭvidis bonan okazon por ke Esperanto iamaniere, kunlaboru en la "II Juegos Polideportivos Inter-Clubs". La solvo venis rapide: donaci trofeon sub la nomo Esperanto. Ĝi estis bela pokalo donacita de nia samideano Carlos Boloix.

La 2-an de junio okazis bela festo por proklami la venkintojn kaj disdoni la trofeojn.

La pokalon ESPERANTO ricevis Ana Isabel GUALLAR ROMEO, vera promeso por la sporto en Aragón. Ŝi praktikas naĝadon, kaj apartenas al la "Centro de Natación HELIOS". Kvankam pro ŝia aĝo apartenas al infana kategorio, ŝi ankaŭ partoprenas en konkursoj de junulara kategorio.

Ana Isabel Guallar partoprenas en Konkursoj de la jaro 1971, kaj de tiam estas ĉampionino de Aragón laŭ diversaj stiloj. Por ne trolongigi la rilatadon de ŝiaj meritoj, mi nur diros ke en 1971 ŝi atingis la ĉampionecon de Aragón en infana kategorio en la pruvoj delfena, sur dorsa kaj libera; en 1972, ŝi partoprenis kvar regionajn Konkursojn, du el ili absolutaj, en ĉiuj ŝi atingis la ĉampionecon en diversaj pruvoj kaj stiloj; en 1973, krom partopreni en pluraj Konkursoj regionaj kaj provincaj, kaj en ĉiuj atingi la ĉampionecon en diversaj pruvoj, ŝi estis rekordulino en 26 malsamaj pruvoj, stiloj kaj kategorioj. En ĉi tiu jaro, 1974, ĝis nun ŝi estas rekordulino en 17 malsamaj pruvoj, stiloj kaj kategorioj, kaj ŝi atingis la ĉampionecon en la Vintraj Konkursoj de Aragón (absoluta).

En la "II Juegos Polideportivos Inter-Clubs de Zaragoza" oni klasifis ŝin la unuan en la pruvoj 100 m. sur dorsa, 200 m. individuaj stiloj kaj 400 m. liberaj, pro kio ŝi ricevis kiel trofeon la pokalon ESPERANTO.

Ĉar, krom esti bonega naĝistino, ŝi estas klera studentino, tutcerte, kiam ŝi partoprenos en internaciaj konkursoj, ŝi ne havos lingvajn problemojn ĉar ŝi estos jam atinginta la ĉampionecon en la scipovo de la Internacia Lingvo.



Jen la momento, kiam S-ro Víctor Ortiz Gratal, estrarano de H.E.F. de la Hispana Turisma Esperanta Sekcio kaj de «Frateco» donas la pokalon Esperanto al Ana Isabel GUALLAR ROMEO.

---

Kiel mi diras je la komenco, dum urbaj printempoj festoj, en du okazoj Esperanto ludis rimarkindan rolon. Laŭ mia opinio, multaj el tiuj personoj, kiuj tiom parolas pri Esperanto en la praktiko, povus primediti tiujn du okazaĵojn.

*Inés Gastón*




# XXXIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

**Valladolid 18 - 22 de Julio de 1974**

## PROGRAMA PROVISIONAL

*Día 18*

Recepción de congresistas y distribución de documentaciones en la sede del Grupo Esperantista —Dos de Mayo, 4—.

18,— h. Reunión de H.E.J.S. —Salón Parroquial de San Andrés—.
"Interkona vespero" —Sala "Pax", Plaza de España—.

23,— h. Baile juvenil con elección de "Fraŭlino Esperanto".

*Día 19*

10,— h. Misa en Esperanto —Iglesia de Ntra. Sra. de la Paz, Plaza España—.
12,— h. Solemne inauguración del Congreso (Sala Borja).
16,— h. Reunión de la Directiva de la Federación Española de Esperanto con los Delegados de Grupos —Caja de Ahorros Popular—.
18,— h. Reunión de Secciones y de K.E.H.A. —Caja de Ahorros Popular—.
19,— h. Reunión informativa sobre U.E.A.
20,— h. Conferencia en Esperanto —Caja de Ahorros Provincial—.
22,— h. Concierto —Patio Herreriano—.

*Día 20*

9,— h. Visita turística a la ciudad —Salida del Grupo Esperantista—.
12,30 h. Recepción Oficial en el Ayuntamiento.
17,— h. Exámenes —Grupo Esperantista—.
20,— h. Conferencia en español —Caja de Ahorros Provincial—.

*Día 21*

Excursión de todo el día a Salamanca, con fiesta Campera —Salida Grupo Esperantista—.

*Día 22*

9,— h. Visita a fábricas —Posiblemente: Helios, Uña y Cruz Blanca—.
17,— h. Junta General de la Federación Española de Esperanto.
20,— h. Solemne Clausura del Congreso —Sala Sindical—.
22,— h. Banquete Oficial en el Hotel Olid Meliá.

*Día 23*

Excursión de postcongreso, "Ruta Juan de Austria".

---

Para más informes e inscripciones, dirigirse a:
XXXIV Congreso Español de Esperanto. Dos de Mayo, 4. VALLADOLID.

TIP C. BOLOIX -REINA FABIOLA, 7 -ZARAGOZA

D. L. Z. - 375 - 63